POLA ESPERANTISTO
(Esperantysta Polski)
MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

JARO XVIII. WARSZAWA — MARTO|APRILO 1924. № 3|4 (101|102)

JĘZYK ESPERANTO A SŁOWNICTWO NAUKOWE.

Każdy naród, rwący się ku szczytom wiedzy, ma w skarbach swej mowy opracowaną technikę słowa, a tem jest słownictwo naukowe, pozwalające zgłębiać każdą specjalną dziedzinę wiedzy.

Fizyka czy chemja, prawo czy medycyna, astronomja czy filozofja, architektura, czy wszelkie dziedziny technologji, w trakcie swego rozwoju wymagały przedewszystkiem słowa, któreby ich istotę, ich prawdy uzewnętrzniło. Słownictwo naukowe tym wymogom w językach narodów kulturalnych czyni zadość, wszędzie jest ono rozwinięte i wszędzie się rozwija, dążąc do doskonałości wysłowienia w mowie ojczystej, toż samo dzieje się w mowie, która stała się żywą, w języku Esperanto, który posiada nieograniczoną możność rozwoju, jak każdy inny język żyjący.

Słownictwo naukowe Esperanta jest w pełni rozwoju: każda dziedzina wiedzy znajduje w Esperancie niezbędne wyrazy, dzięki logicznie i genjalnie zbudowanej podstawie, z jakiej w Esperancie tryska możliwość tworzenia takich lub innych słów. Rozwija się to słownictwo i rozwijać się będzie stale. Polskie słowniki Grabowskiego i Zakrzewskiego, francuski encyklopedyczny słownik Veraxa, ujmujący w sobie wszelkie dziedziny wiedzy — astronomję, matematykę, fizykę, chemję, zoologję zupełnie są wystarczające dla specjalistów tych dziedzin, tegoż Veraxa ściśle technologiczny słownik (Vocabulaire technique et technologique), 9-cio językowe vademecum międzynarodowej farmacji, ułatwiające preparowanie recept pisanych w rozmaitych językac , pozatem wieloliczne słowniki we wszystkich językach

narodów kulturalnych; terminologja muzyczna opracowana przez wybitnego esperantystę i muzyka de Menila, terminologja marynarska opracowana przez inżyniera Rollet de L'Isle, inżynierahydrografa marynarki francuskiej — oto podstawa, na której wszelkie dziedziny wiedzy znajdują w Esperancie swe oparcie. Rzeczywiście, stopniowo sprawa uświadomienia, że dla wiedzy język Esperanto okazać może niezmierzone usługi, staje się coraz jasniejszą

W 1908 roku Dr. Corret na wszechnicy paryskiej obrał jako temat do swego doktoratu: „O użyteczności języka Esperanto w medycynie", gdzie wystąpił jako rzecznik Esperanta i otrzymał za obronę najwyższy stopień odznaczenia. Na międzynarodowym kongresie lekarskim w Budapeszcie, poza językami francuskim, angielskim, niemieckim i włoskim, język Esperanto był 5-ym językiem obrad.

Towarzystwo londyńskie (Illuminating Engineering Society) uchwaliło, że wszelkiego rodzaju komunikaty i dzieła fachowe mogą być przesyłane towarzystwu i w języku Esperanto. Związek lekarzy esperantystów liczył przed wojną przeszło 1000 członków i posiadał swój własny organ „Voĉo de Kuracistoj" wydawany we Lwowie Obecnie wychodzi w Budapeszcie „Internacia Medicina Revuo", przegląd prac lekarskich z pism wychodzących w Europie i Ameryce; prace lekarzy polskich znajdują w nim szerokie uwzględnienie. Na drugim kongresie esperantystów w Genewie powstał międzynarodowy związek esperantystów - prawników, którego zadaniem było pomiędzy innemi opracowanie słownictwa prawniczego i wydawanie prac z zakresu prawoznawstwa. W znakomicie redagowanym przed wojną miesięczniku „Internacia Scienca Revuo" przesunął się cały szereg artykułów, posiadających dla świata nauki wybitną wartość Wojna, jak we wszystkich dziedzinach, tak też i w dziedzinie Esperanta zahamowała rozwój, lecz obecnie na niwie Esperanta odradza się życie coraz bujniej.

W 1920 roku ukazał się zeszyt w którym opracowana została terminologja prawnicza. Na fakultecie w Lille dr. Vanverts, prof. chirurgji, miał wykład w Esperancie o leczeniu radem. W 1923 roku wyszedł słownik opracowany przez Wüstera, zawierający terminologję maszynoznawstwa (maŝinfaka terminaro). w Anglji ukazały się dwa fachowe słowniki, Oto wskazany w skrócie dorobek Esperanta w dziedzinie wiedzy. Widzimy więc, że i w tej dziedzinie język Esperanto, mający trwałe podstawy życia i bytu, może okazać ludzkości nieocenione usługi.

T. K.

Kelke da vortoj al ĉiuj verdaj amikoj — kaj ankaŭ al duonverduloj...

En mia urbo vivas fama esperantisto, kies nomo estas respektata de ĉiuj samideanoj „en teropartoj kvin". Li estas unu el la ĉefoj de tiu glora pionira armeo, kiu kun la Majstro kaj ĉe liaj flankoj kreis nian movadon. Sed li jam antaŭ longa tempo forlasis nin.

Pri lia eksiĝo oni babilis diverse. Oni suspektis personan ofendiĝon, ian el tiuj privataj malkomprenoj, kiuj ofte forprenas al ni kamaradojn, ne la plej bonajn.

Sed lastatempe mi aŭdis rakonton, kiu — konsiderinte la personon kaj la cirkonstancojn — ŝajnas al mi plej fidinda. Laŭ ĝi, tiu granda esperantisto perdis la konfidon al la sukceso de nia afero. Li perdis ĝin en la jaro 1908, kiam S° Ido naskis sian verkon. Novan, genian lingvon tutmondan, kiu anstataŭos venke Esperanton kaj gloriĝos por ĉiuj centjaroj la nomon de sia kreinto. De tiu momento jam multaj jaroj pasis for. Baldaŭ militservos la buboj, kiuj tiam ekvidis unuafoje la mondon. Laŭ ekzemplo de „Esperanto" ankaŭ la pseŭdonomo de S° Ido fariĝis nomo de nova „lingvo internacia".

S° Ido ne restis sola. Lian kombinon ekenviis aliaj: S° Antido, S° Medialulo, Prof. Ankeisto, S° Malujanto. Ili ĉiuj avidas pri senmorteco. Kelkaj volas fariĝi „aŭtoro de la lingvo internacia" *tout court,* aliaj estas pli modestaj — al tiuj sufiĉas la titolo de Reforminto, ili volas nur esti io en la speco de Luther aŭ Cauvin en la lingva sfero, tiel, ke — post centjaro — infanoj ripetadu en lernejo:

> „La lingvon internacian kreis unue Doktoro Ludwik Zamenhof, sed genie trafaris ĝin poste la fama scienculo — Prof. Ankeisto — S° Malujanto — S° Medialulo..."

Ho ve, inter revoj kaj la vivo reala granda estas diferenco!

Esperantistoj koleras kontraŭ la malutila memfido de nesukcesintaj senmortuloj. Sed ankoraŭ pli devas koleri S° Ido. Efektive, nur li havis ŝancon pri sukceso. Ŝancon... duban, kaj dependan plene de unu kondiĉo: ke neniu plu tia spritulo troviĝos, kiel li. Se ekzistus nur Doktoro Esperanto kaj S° Ido, kaj iliaj du lingvoj internaciaj — tiam oni povus serioze diskuti inter ili.

Sed S° Ido sin trompis kruele. Li pensis, ke nur li estas genia, la aliaj pruvis al li, ke ili estas ne malpli tiaj. Tiu „genio" estas ja facila: oni kreas kelkajn sufiksojn, elektas

laŭplaĉe novajn radikojn, ŝanĝas gramatikajn formojn. Eĉ infano tiaman ere dum duonhoro povas „baki" novan lingvon internacian. Sufiĉas preni Esperanton, aŭ Idon, aŭ Medialon, fari la necesan operacion — kaj hop! vi fariĝas senmorta.

Nur... nur la mondo ne estas ja tiel stulta, sinjoroj. Vi faris unu eraron — grandegan, kolosan eraron: vi pensis, ke la genio de Zamenhof estas de la sama speco, kiel la via. Kolego Zamenhof diris „Svisujo", kolego Malujano korektas lin, kaj diras: „Svisio". Nu, inter egaluloj tio okazas ofte. Unu eraras, alia riparas. Restis ankoraŭ vasta kampo por novaj talentoj oni povas ja diri: Svisajo, Svisejo, Svisojo... eĉ Svislando. —

— Ĉu vi memoras?

Kiel subita radio ekbrilis super la mondo nia ĉarma, melodia lingvo. Ĉiu, kiu legis la libron de Doktoro Zamenhof, ekkriis kun ĝoja miro: — kiel facila! Ĉiu amanto de la grandioza ideo de lingvo internacia benis la genian aŭtoron pro lia malavara donaco al la bezonantaj popoloj.

Sed venis homoj kun koroj malpuraj, kiuj legis kaj pensis: „Jes, *nun* mi scias, kiel oni faras lingvon internacian. Tio estas facila. Mi fabrikos novan."

Ho, ne! Nenian novan lingvon! Nenion novan ĝenerale. Ĉar konsideru:

Kio estis plej genia en la admirinda verko de Zamenhof, tio naskiĝis *antaŭ* ol li kreis la lingvon Esperanto. Tio estis lia penso. nova kaj simpla, kiel ĉiuj vere grandaj homaj ideoj. Li diris al si:

„La popoloj interbatalas kaj suferas. Ili ne komprenas unu la alian. Ili bezonas do lingvon komunan. Malamo ne permesos al ili elekti ian ajn lingvon nacian. Mia lingvo devas esti artefarita. Ĝi defas esti facila. Mi ĉerpos el la plej konata materialo, el tiuj lingvoj eŭropaj, kiuj estas plej multe uzataj. Mi elektos plej simplajn formojn gramatikajn, el la radikaro mi elsuĉos tion, kio estas plej mallonga, plej facile lernebla kaj plej belsona. Kreinte tiel mian lingvon, mi ne rapidos ĝin publikigi. Mi atendos kaj korektos. Nur post jaroj mi sendos mian karan infanon en la suferantan mondon."

Tia estis la naska ideo de Esperanto. Diru, reformistoj, ĉu eĉ unu el vi havis ĝin, antaŭ ol aperis la Lingvo Internacia?

Ne, ĉiuj vi prenis la ideon de Zamenhof. Vi prenis ĝin en ĝia plena tuto, kaj — ŝanĝinte kelkajn formojn, kelkajn radikojn, laŭ via plaĉo dependa de via logikо kaj persona temperamento — sur la libro pri lingvo internacia laŭ principoj de Zamenhof vi metis — vian propran nomon. Por honto. Ĉar laŭ tiuj principoj — geniaj principoj de Zamenhof — oni povas

ja krei cent lingvojn, mil lingvojn, el kiuj neniu estos pli bona, ol la antaŭaj, kaj, permesu al mi kredi, ĉiuj pli malbonaj, ol Esperanto. Kial? — Nu, ĉar ĝin kreis ja Zamenhof, kies estas la principoj. Lian verkon povus superi nur tiu, en kies kapo naskiĝus same simpla kaj same genia nova *principa* ideo pri lingvo tutmonda.

Ĉu venos iam tia homo?

Mi ne kredas. Mi pensas, ke Esperanto estas tute sufiĉe simpla kaj bela por kontentigi la bezonon de la homaro. Plua natura vojo de ĝia disvolvo estas *evoluo,* kontrolata de la Lingva Komitato. Ĉu vi imagas, karaj amikoj, kian neelĉerpeblan fonton de freŝaj fortoj akiros nia lingvo, kiam ĉiuj popoloj ekparolos ĝin, kiam en nia Lingva Komitato meditos plej taŭgaj kaj plej geniaj kapoj de la mondo? Ĉu ni rajtas nun trudi niajn personajn opinietojn, ŝanĝi laŭ ili la lingvon, kiu estas komuna trezoro de la tuta granda homaro?

Kiu ni estas? Simplaj, modestaj homoj, gardantoj efemeraj de la verko de geniulo. Tial nur kun maldolĉa rideto oni povas akcepti tian aserton de ĝeneva „Esperanto", kiu postulas, ke pri „Svisujo" oni permesu al Svisoj rezigni, „ĉar ili neniam ŝatis la vorton". La svisa popolo, same kiel ĉiuj aliaj, ne vidas ankoraŭ Esperanton. Ĝin vidas kaj konas nur kelkaj dekmiloj da personoj. Tial ili ĝin ŝatu, kaj ne forprenu pecojn el la juvelaro, kiu ne al ili apartenas.

S-oj Ido, Antido, Medialulo, Ankeisto, Malujanto kaj iliaj similuloj ne estas kolegoj de Zamenhof. Ili havas nur unu komunan kolegon, kiu nomiĝas: S-o Memtrompulo.

Saluton!

Jan Kostecki.

Stefan Żeromski.

Al la plej grandaj verkistoj de Polujo de l' unua kvarono de XX jarcento apartenas sendispute Stefan Żeromski. Jam en la unuaj verkoj la brilo de lia talento estis tiom forta, ke ĝi donis garantion al la juĝoj, konstatintaj ĝian neordinarecon.

Żeromski aperas ĉe la fino de pasinta jarcento kaj tuj donas la veran respegulon de agordoj de postromantisma periodo: li pentras la suferon de animoj en la tempo de subpremo, prezentas malgajegajn bildojn de mizero, priskribitajn kun granda realismo; la treege peza vivbatalo, tuta ĝia doloro kaj mizero — ĉio tio trovis fortan esprimon en la verkoj de Żeromski.

Oni devas memori, ke la periodo de verkado de Żeromski komenciĝas en la tempo post la ribelo de 1863. En tiu ĝuste periodo maturiĝadis la talento, kiu elkantis la tutan mizeron de rezignitaj animoj, ne batalantaj jam pri pli bona morgaŭo, sed subiĝantaj al la sorto, kiu estis senkompata kaj kiu ĵetadis tiujn animojn en la profundaĵojn de plej ekstrema pesimismo kaj malespero. Tute prave do Żeromski estas nomata la historiografo de pola animo.

La verkoj de Żeromski estas profunde malgajaj, turmentoplenaj kaj ege emociantaj. En la unuaj jaroj de sia verkado li estis influita de rusaj realistoj (Turgenjev kaj Dostojevskij), rememorante aŭkaŭ samtempe francajn impresionistojn kaj naturalistojn (Goncourt kaj Zola).

La fonto de turmentoj, la fonto de tia kaj ne alia kreado de Żeromski, estas la sola vido de homa mizero kaj homaj suferoj. Je tio konsistiĝis du principaj ecoj de lia interna strukturo: la impresema koro kaj akra observemo. Krom tio videbliĝis ĉe li la nacia kaj demokrata sento kaj la manko de kredo en la venkon de bona ago.

La herooj de liaj romanoj agas laŭ tio, kion ordonas al ili la menso kaj koro, sed ĉio tio vaniĝas. Dolora lirismo pleniĝas ĉiujn paĝojn de liaj romanoj, kaj la bildoj de fizikaj kaj moralaj suferoj estas desegnitaj kun eksterordinara forto. Ĉie regas malhelaj koloroj.

La malbono laŭ la kompreno de Żeromski estas senkompata, ĉar ne atingas ĝin eĉ la plej eta radio de optimismo.

La malbono ne troviĝas en institucioj, nek en homaj individuoj — ĝi estas ekster ili, dissemita en la kosmo, ĝi estas blinda kaj ĝuste tial senkompata.

La naturo estas kruela, la vivo „rabista", tamen la malbono ne trafas kanajlojn kaj sentaŭgulojn, sed homojn la plej bonajn, kiuj eliras batali kun tiu „ordo" natura kaj homa.

La sola celo, por kiu indas vivi, estas la malpligrandigo de tiu malbono per unu almenaŭ guto oceana.

Kaj la malbono estas nur unu: ĝi estas la homa sufero.

„Homo — ĝi estas afero sankta, al kiu malbonfari permesite estas al neniu".

Kaj rezulte el tio — „Estimu la homon — jen la instruo"! Instruo plej simpla, sed la plej granda el ĉiuj.

En tiu ĝuste instruo kuŝas la plej granda valoro de l'kreado de Żeromski, sur tio estas bazitaj ĉiuj liaj verkaĵoj.

Stefan Żeromski naskiĝis en 1864, la gimnazion li finis en 1886 kaj en sama ankoraŭ jaro li ekkomencis la universitatajn studojn en Warszawa, kiujn li tamen baldaŭ devis ĉesigi kaj ekloĝi en kamparo pro malbona sanstato. Dum pli

longa tempo li okupiĝadis per privata instruado en diversaj partoj de l'lando. Li ekkonis ĉiujn sociajn sferojn, li satvidis la bonstaton kaj mizeron observante la vivon en ĉiuj ĝiaj formoj.

En jaro 1892 li forveturis Svisujon, kie li loĝis kvar jarojn, vizitante de tie Italujon, Francujon kaj Germanujon. Ĉe la fino de lia restado en Svisujo li fariĝas bibliotekisto de fama pola muzeo en Rappersville. De jaro 1896 li restas jam en Polujo, forveturante de tempo al tempo eksterlanden por plibonigo de l' sano.

La unuaj el la verkoj de Żeromski „Rakontoj" (1896) donas al li tuj la nomon de neordinara verkisto. Jam tiam li forte skuis la animkordojn de legantoj kaj vekis teruron per la temo. Tiuj unuaĵoj promesis grandan talenton. Sub la pseŭdonimo de Zych li eldonis antaŭe (1895) volumon da rakontoj, titolitan: „Dispecigos nin korvoj, kornikoj...", kiuj rakontoj donis antaŭguston de vera talento. Tio, kion ni renkontas en tiuj du verkoj, kiel ankaŭ en la pli poste eldonitaj „Sizifaj laboroj" kaj „Romanverkaĵoj" — tiu karaktero de l'kreado, tiu maniero de priskribado, de ensentiĝo en la homan vivon ĝis la plej etaj detaloj, la elmontro de ĝiaj vundoj, bataloj, krioj de malespero, de sorto malbenita — ĉio tio estos en la pli postaj verkoj pliprofundigita kaj majstre reliefigita.

„Homoj senhejmaj" (1900) trovis Żeromski'n sur la plej alta ŝtupo de la verkado. En tiu romano donis Żeromski la plenesprimon de sia sentemo, de siaj travivaĵoj, de siaj ideoj. La nobla kuracisto Judym, socia aganto kaj ideulo, batalas kun plena sinforgeso, kun rezigno de propra feliĉo, simile al Dro. Strockman de Ibsen. La eksterordinara sentema enhavo de l'romano superas ĉion, kio ĝis nun estis prezentita en skriba formo.

Tiu „senhejmeco" de homoj, kiuj forte soifas tiun bonon kaj vidas la teruran disproporcion inter sia emocio, inter sia bon-avido kaj la socio — estas grandega. Ili sentas la mankon de grundo sub la piedoj, ili sentas, ke iliaj fortoj estas tro kadukaj por preni sur la ŝultrojn la tutan ŝarĝon de l' vivbatalo, por lukti kun la koloso, kies nomo estas Malbono. Ili sentas sin pro la kontraŭstaroj kaj pasiveco de l' socio — solecaj, malfortaj kaj ĝuste „senhejmaj". Tia estas Judym kaj tiaj estas ĉiuj al li similaj herooj de Żeromski.

Tiujn grizajn portretojn de homoj, tiun ĉiutagan grizecon sekvas potenca bildo de nacia pasinto — historia romano el la tempoj de Napoleono „Cindroj" (1904). La agado okazas inter la fino de XVIII jarcento kaj la militiro kontraŭ Moskvo.

Hejmaj kaj militaj scenoj, bataloj kaj amaj situacioj trovis en la romano beleġan esprimon. Bildoj el la vivo de pola nobelaro, bildoj de Warszawa, Venezia, Hispanujo, la tuta

odiseado de Legionoj — preterpasas antaŭ la okuloj de leganto per vivaj pentritaj koloroj. Kio koncernas la formon de l' romano, do Żeromski donis en „Cindroj" pruvon, ke historia romano povas konsisti el apartaj bildoj, libere ligitaj, kaj ke ne nepre la tuta agado devas koncentriĝi ĉirkaŭ la heroo, nek la okazintaĵoj ne nepre devas esti ligitaj unuj kun la aliaj.

Post „Cindroj", preninte temon el antikva Polujo li skribas (1906) „Historion pri la brava Valguro", kiun en 1908 sekvas „Medito pri la Hetmano", verkita sur la fono de militoj de XVII jarcento.

Tiuj du potencaj verkoj atestas pri varma nacia sento kaj prudenta politika penso.

En la tempospaco ĝis jaro 1912 aperas: „Rozo" (revolucio 1905), „Historio de l'peko", „Sułkowski", „Ĉarmo de l' vivo" kaj „La fidela rivero". Dum la milito interalie aperis: „La batalo kun satano" (trilogio), „Eraroj", „Snobismo kaj progreso", „Marvento", „Intermaro" kaj la scenaĵoj: „Blanka ganto", „Pli blanka mi iĝos ol neĝo" kaj „Turoń".

Se pro tute aliaj kaŭzoj oni nomis Shelley'on „cor cordium" — do alnomon tiun meritis en Polujo Żeromski, ĉar pri neniu alia pola verkisto oni povas diri, ke en liaj verkoj frapas la koro de nuntempa Polujo.

Li skribis multon. Ĉiu verko, ĉiu paĝo, ĉiu linio en la verkaĵoj de Żeromski atestas pri profunda penso, pri ensentiĝo en ĉiun frapon de homa koro, pri la kompreno de homa animo, pri la kunsento al ĉio, kio lin ĉirkaŭas — ĉar li ensentiĝas en la vivon de l' naturo, komprenas ĝin, kun ĝi plendas aŭ ĝojas kun ĝi.

La lingvo de Żeromski apartenas al tiuj malofta] perloj de pola lingvo, kiuj instruas, montras novajn vojojn, estas belegaj en sia izoleco, ĉar prenitaj ofte el la buŝo de popolo kaj mirinde en la verkoj trafaritaj.

En ĉiu rilato restigas Żeromski postsignojn en la juna generacio de nuntempaj verkistoj kaj kiel tia li restos la plej granda verkisto de hodiaŭa Polujo.

Karol Pigłowski, Łódź.



Bibliotekoj en Polujo.

La pola popolo, forte ligita kun la kulturo de l'Okcidento, jam antaŭ longe komprenis la signifon de bibliotekoj kaj fondadis ilin laŭpove en diversaj kulturcentroj de sia lando. Ne konsiderante la monaĥejajn bibliotekojn, kiuj, laŭ ekzemplo de l'Okcidento, ekzistis ankaŭ en Polujo kaj kiuj sendube siaspece influis la evoluon de pola kulturo — lando nia jam en XIV jarcento ekkomencas la kreadon de libraroj, havantaj publikan karakteron. Al tiaj apartenas la ĝis nun ekzistanta Jagellona Biblioteko en Kraków.

La sekvantaj jaroj plifortigadis la bezonon de bibliotekoj kaj en XVII jarcento Polujo povas fieri jam per granda nombro de bibliotekoj, fondataj plejparte de grandaj polaj magnatoj, kiel ekz. el familioj: Lubomirski, Czartoryski, Ossoliński, kiel ankaŭ de homoj, protektantaj la sciencon, ekz. magnato Załuski.

La dispartigo de Polujo per la tri pli fortaj najbaroj, interrompas la konstantan plimultiĝadon de bibliotekoj. Kelkaj bibliotekoj estis entute el la lando forportitaj (Załuski - Biblioteko en Warszawa), aliaj estis ekstermitaj (Raczyński - Biblioteko en Poznań) kaj la restintaj ĉesis evolui. El la restintaj kulturriĉaĵoj estis ankoraŭ fondataj sufiĉe riĉaj polaj libraroj en eksterlando, kien oni sukcesis ilin forporti. Tiel fondiĝis la bibliotekoj en Rappersville kaj en Paris.

Kun la momento de reakiro de l'sendependeco, la pola popolo rekomencis intensivan laboron sur la kampo de kreado kaj organizado de bibliotekoj. Konsiderante tamen la novajn tempojn kaj aliajn edukideojn, tiuj celadoj ne iras en la direkto de fondado de grandaj libraroj, kiuj enhavus malnovajn verkojn de muzea valoro — sed oni kreas instituciojn, alkonformigitajn al la bezonoj de civitano de l'Ŝtato de 20 jarcento. Specialan atenton oni turnis sur sciencajn publikajn bibliotekojn kaj bibliotekojn t. n. ĝeneralajn kun miksita karaktero beletristike-scienca. En la jam fonditaj polaj publikaj bibliotekoj oni enkondukis ĉiajn faciligojn, ebligantajn al la leganto la profitadon de libroj, diferencigante ilin de bibliotekoj de malnova tipo, kie, pro posedo de valoraj antikvaĵoj, oni konservis grandan singardemon.

Novaj tempoj aliigis ankaŭ la opiniojn pri la bazoj de materiala ekzisto de bibliotekoj. Se iam la ekzisto de bibliotekoj estis bazita je socia filantropio, tiom nun la publikaj bibliotekoj komencas apogiĝi je budĝetoj de urbaj komunumoj aŭ je tiuj de l'Ŝtato.

Polujo posedas ĉiujn tipojn de bibliotekoj, krom granda nacia, kiu enhavus ĉiujn fruktojn de nacia spirito en skriba kaj

presita formo. La realigon de tia institucio malhelpis la politika mallibero. Sed nun tiu afero fariĝis aktuala kaj en la ĉefurbo de nia lando okazas konferencoj de specialistoj kaj reprezentantoj de l'registaro en afero de fondo de nacia biblioteko, kiun kosistigus sekvantaj libraroj: a) la iama Załuski-Biblioteko, vindikata nune el Rusujo laŭ la traktato de Riga, b) biblioteko el la muzeo en Rappersville kaj c) la Pola Biblioteko en Paris. Sendepende de tio, la nacia biblioteko estus kompletigita per tiaj verkoj el la Ŝtatbibliotekoj, kiuj, konforme al ĝia regulare difinita karaktero, estus tie necesaj.

La suba revuo de plej gravaj urboj en Polujo, en kiuj troviĝas bibliotekoj, donas iugrade imagon pri la legamo en nia lando.

WARSZAWA posedas entute 86 bibliotekojn. Inter ili estas: 1 universitata, 11 speciale-sciencaj, 2 publikaj kaj 73 ĝeneralaj. La Universitata Biblioteko portis iam la nomon de Ĉefa Biblioteko, estis fondita en jaro 1817, kalkulas nun pli ol 700.000 volumojn. La Publika Kierbedź-Biblioteko, fondita en 1906, nombras 200.000 volumojn, la Publika Krasiński-Biblioteko, fondita en 1844, nombras 250.000 vol.

KRAKÓW. Posedas 15 bibliotekojn: 1 universitatan, 5 speciale-sciencajn, 9 ĝeneralajn. La Universitata Biblioteko t. n. Jagellona, fondita en XIV jarcento, posedas 500.000 vol. La Biblioteko de l'Akademio de Sciencoj, fondita en 1873, kalkulas 100.000 vol.

LWÓW nombras 33 bibliotekojn: 1 universitatan, 8 speciale-sciencajn, 1 publikan, 23 ĝeneralajn. La Universitata Biblioteko, fondita en jaro 1784, nombras 240.000 vol. La Publika Ossoliński-Biblioteko, fondita en 1793, posedas 140.000 vol.

WILNO. Entute 17 bibliotekoj. Inter ili: 1 universitata, 2 speciale-sciencaj. La Publika Biblioteko, fondita en 1913, posedas 65.000 volumojn.

POZNAŃ nombras 18 bibliotekojn, inter ili: 1 universitata, 3 speciale-sciencaj, 1 publika, 10 ĝeneralaj. La Universitata Biblioteko, la iama Imperiestro-Wilhelm-Biblioteko, estis fondita en 1898, nombras nun 180.000 vol. La Biblioteko de l'Societo de Amikoj de Sciencoj, fondita en 1857, nombras 140.000 vol.

ŁÓDŹ posedas 84 bibliotekojn: 1 publikan, 3 speciale-sciencajn kaj 80 ĝeneralajn. La Urba Publika Biblioteko fondiĝis en 1916, nombras nun 30.000 volumojn. La speciale-sciencaj estas: B. de l'Societo de juristoj, B. de l'Societo de kuracistoj kaj Urba Centra Pedagogia Biblioteko.

La cititaj en ĉi-supra skizo materialoj ne enhavas ĉiujn polajn bibliotekojn. La amplekso kaj karaktero de tiu-ĉi artikolo devigis la aŭtoron preterlasi multe da polaj urboj kaj urbetoj, kiel ankaŭ multon da bibliotekoj pli kaj malpli gravaj, kiuj tamen kune kun la parencaj institucioj en la grandaj urboj — favoras la evoluon de l'kulturo sur pola tero.

Jan Augustyniak
Bibliotekisto ĉe Publika Biblioteko en Łódź.

V Kongreso de Pola Esperanto-Asocio.

Warszawa, 6-7-8 Septembro 1924.

Dua Komuniko.

Ŝanĝo de dato. La Kongreso ne okazos en junio, sed la 6, 7 kaj 8 de septembro. Tiu prokrasto montriĝis necesa tial, ke la unua komuniko pri la kongreso, kiu devis aperi en decembro, pro interrompo en la eldonado de „Pola Esperantisto" aperis nur en fino de marto. La graveco de pridiskutotaj problemoj, same kiel diversaj kongresaj aranĝoj (konkursoj, ekzamenoj) postulas, ke la pola esperantistaro havu sufiĉan tempon por ilin konsideri kaj konvene prepariĝi.

Aliĝoj. Ni insiste petas ĉiujn samideanojn, kiuj intencas partopreni la Kongreson, ke ili aliĝu *kiel eble plej baldaŭ.* Jam antaŭ somero la Komitato nepre devas scii, kiel multnombra estos la Kongreso. Sen tio neeble estas elekti konvenan kongresejon, rezervi sufiĉan nombron da loĝejoj por kongresanoj kaj bone prizorgi ĉiujn aliajn entreprenojn. Ni ankaŭ bezonas monon por la preparaj laboroj kaj tial ni baldaŭ devos altigi la kotizaĵojn, kiuj tamen ĝis 15 junio restas la samaj:

1. Kongresanoj subtenantoj 3 orfrankoj
2. „ ordinaraj 1 ½ „
3. Lernanta junularo . . 1 „

Apartaj kvitancoj por ricevitaj kotizaĵoj ne estos sendataj. Ilin anstataŭos kongreskartoj, kiuj jam estas presataj kaj kiujn ni dissendos baldaŭ al ĉiuj aliĝintoj.

Aliĝilojn ni dissendas kun „Pola Esperantisto". Kiu ne havas ilin, skribu sur karteto sian nomon kaj adreson kaj kun la kotizo sendu al la Komitato.

Pridiskutotaj problemoj. Laŭ laborprogramo, publikita en nia unua komuniko, ni vidas, ke la ĉefaj demandoj pri kiuj okupiĝos la Kongreso estas jenaj:

1. Rilato de la Pola Socio al Esperanto.
2. Organizo de Pollanda Esperantista Movado.
3. Interna vivo de Pola Esperanto Asocio.

La unuaj du el tiuj gravaj problemoj interesas ĉiujn senescepte polajn esperantistojn. Ili estas tre malfacilaj kaj komplikitaj, kaj ilia solvo postulas kunlaboron de ĉiu, kiu povas doni pri ili ian valoran ideon.

La Komitato volonte akceptas kaj konsideras ĉiujn proponojn kaj projektojn pri la supre menciitaj temoj. Ankaŭ liberaj proponoj al la Kongreso estas allasataj.

Ĉiuj proponoj devas esti sendatoj al la Komitato *ĝis 1 aŭgusto 1924.*

Sed atentu! El *same valoraj* projektoj tiuj estos unue esplorataj kaj metataj en la tagordon, kiujn ni ricevos *pli frue.*

Tial, se vi havas proponon, kiun vi opinias utila kaj diskutinda, rapidu alsendi ĝin!

Konkursoj. Okazas kvar konkursoj, ĉiuj pri temoj *mallongaj,* kaj nome:

1. Aforismo pri Esperanto.
2. Poezio ĝis 50 versoj.
3. Noveleto ĝis 5000 vortoj.
4. Pola artikolo propaganda pri Esperanto (2 kolonoj en ĉiutaga gazeto).

Templimo: 1 aŭgusto 1924. La nomo de konkursanto devas troviĝi en aparta fermita koverteto, signita per devizo.

„Jury" konsistos el konataj polaj verkistoj esperantaj. Ilian nomaron ni publikigos poste.

Premioj: krom jam ricevitaj libroj, ni ricevis tre valoran librokolekton de S-o Włodzimierz Pfeiffer el Łódź, kaj de Fratoj Fethke el Bydgoszcz 10 ekz. de ilia novelaro. La donacintojn ni kore dankas. Aliaj imitu ilian ekzemplon! Ankaŭ monsumoj por tiu celo estas akceptataj.

La premiitaj verkoj estos presataj en „Pola Esperantisto" kun konforma mencio.

Ekzamenoj. Sub prezidanteco de D-ro Leono Zamenhof okazos ekzamenoj: lerteca kaj instruista. Ekzamenantoj estos profesiaj pedagogoj, diplomitaj instruistoj de Esperanto. Pri detaloj kaj kostoj vidu nian unuan komunikon.

La kandidatoj por ekzameno ne prokrastu enskribiĝon! Post 15 junio la ekzamenkostoj estos verŝajne altigataj.

Amuzoj. La amuza sekcio publikigos detalan programon en nia sekvanta komuniko.

Fakaj kunsidoj. Ne forgesu mencii sur la aliĝilo, kian fakan kunsidon vi dezirus partopreni. La Komitato prizorgos la efektiviĝon de ĉiu faka kunsido, por kiu anonciĝos ne malpli ol 10 personoj.

Adreso. Adreso por ĉiuj sendaĵoj estas:

Pola Esperanto Kongreso, Królewska 19, Warszawa.

Samideanoj! La sukceso de nia Kongreso dependas de ĉiu inter vi. Precipe en nia lando, kie oni tiel malmulte aŭdas pri Esperanto, necesaj estas grandaj kaj multnombraj publikaj manifestacioj.

Tial ĉiu aliĝu senhezite. Aliĝu tuj!

Pruvu, ke Esperanto vivas!

Pruvu, ke Esperanto estas forta!

Pruvu, ke Esperanto venkos!

Por la Organiza Komitato:

Sekretario: *K. Tymiński.* Prezidanto: *Jan Kostecki.*

Esperanto w medycynie.

Jako przyczynek do wielkiego znaczenia, jakie w stosunkach międzynarodowych posiada język Esperanto, niech posłuży wykaz prac lekarzy polskich, streszczonych w Internacia Medicina Revuo, gazecie lekarskiej, wydawanej w języku Esperanto w Budapeszcie.

Pomiędzy streszczeniami prac wybitnych lekarzy angielskich francuskich, duńskich, holenderskich, niemieckich i węgierskich w jednym 5-tym numerze z roku bieżącego znaleźliśmy streszczenia następujących prac lekarzy polskich, umieszczonych w Polskiej Gazecie Lekarskiej w roku bieżącym:

1) Nowoczesne zmiany poglądów na cukrzycę i jej leczenie w № 17 i 18.

2) O wysypce w durze powrotnym w № 6.

3) W sprawie stosowania nalewki jodowej w № 6.

4) Wpływ proteinoterapji na hematologję i przebieg duru brzusznego w № 7.

5) Otrucie solami barowemi w № 8.

6) Próba leczenia zimnicy zapomocą badania przełomu Widala (vise hemoclasique) w № 7.

7) Leczenie krztuśca w № 9.

Kroniko.

We włoskim mieście Bari wprowadzono język Esperanto do następujących szkół: do królewskiej szkoły handlowej, do królewskiego morskiego instytutu, do kolegjum narodowego, do seminarjum arcybiskupiego i do tak zwanego kolegjum Nasati.

Otwarcie angielskiej wystawy w Wembley pod Londynem było uświetnione przemówieniem królewskim, które niezwłocznie miało być przesłane radiotelegraficznie do wszystkich krańców ziemi w języku angielskim i esperanckim. Nasz PAT zakomunikował o przesłanym radiotelegraficznie przemówieniu królewskim, lecz nie wzmiankował nic o jednocześnie przesłanym esperanckim przekładzie; czyżby o tak ważnym fakcie zapomniał, czy też go zlekceważył?

W mieście Bruges w Belgji 7 i 9 czerwca odbędzie się kongres esperantystów belgijskich.

Międzynarodowy komitet organizacyjny budowy pomnika na grobie twórcy Esperanta D-ra Zamenhofa czyni zabiegi za pośrednictwem poselskich polskich placówek zagranicznych, aby sprowadzenie tego pomnika do Polski i przewiezienie go do Warszawy było zwolnione od opłat celnych i przewozowych.

We wspaniale położonym nad Adrjatykiem starożytnym mieście Jugosławji Spalato (Split) odbędzie się esperancki kongres jugosławiański.

Japońskie Towarzystwo dla celów związku narodów zorganizowało oddział esperancki.

Parlament fiński zatwierdził subsydjum 25,000 marek fińskich na naukę Esperanta.

Na Kursach Berlitzowskich na Bukowinie (Cernauti) wykłada Esperanta major Hasenöhrl.

W Pradze czeskiej w świeżo założonej rzemieślniczej szkole dla ociemniałych czeskie ministerstwo oświaty zaprowadziło język Esperanto, jako przedmiot wykładany obowiązkowo.

Podczas trzęsienia ziemi w Japonji szczęśliwie nie ucierpiały Japoński Instytut Esperancki, jako też drukarnia esperanckiej gazety „Revuo Orienta", jedynie spaliła się Esperantosia, organizacja wydawnictw w języku Esperanto.

La 27/3 1924 okazis jara ordinara Generala Kunveno de krakova „Societo Esperanto". Ĉeestis 40 personoj.

Oni elektis jenan estraron: Son Br. Kuhl: prezidanto
Son O. Bujwid, universitatan profesoron, I. vicprezid.
Sinon Julja Neubergowa, II. vicprezidanto
Son Ign. Wiesenberger. I. sekretario
„ Józef Blewoński, II. „
„ Leopold Goldberger, kasisto
Finon Helena Lemberger, bibliotekistino.

Krome eniris estraron S-ino. Luiza Srebrna kaj f-ino Regina Weinsberg.

Ricevitaj gazetoj.

Nombro en parentezo signifas numeron. — La Semisto (36, 37). En 36-a numero troviĝas komuniko pri Internacia Radio-Asocio kaj la taŭgeco kaj neceseco de Esperanto en la radio-servo. — Marto (4). — Corriere Balcanico Esp. (33) informas pri la enkonduko de Esp. en Reĝa komerca instituto, en Reĝa mara instituto, en Nacia kolegio, en Ĉefepiskopa seminario en la itala urbo Bari. Bari estas la unua inter la urboj de Italujo, kiuj enkonkondukas Esp. en la lernejojn. — International Language (4) enhavas anglan tradukon el Universo de biografio de nia Majstro. La detaloj el la vivo de l' Majstro simple rakontitaj de lia frato Dro Leon Zamenhof estas kortuŝantaj. En la sama numero ni legas gravan avizon pri la ekspozicio en Wembley, nome la malferma parolado de l'reĝo estos en esp traduko radiotelefonita ĉiun terangulon. Belga Esperantisto (107, 108) entenas riĉan programon de Belga kongreso la 7-9 de junio en Bruges; ĝi enhavas ankaŭ detalojn pri la fama historia urbo Bruges.—Informoj de Univ. Esp. Asocio (26).—Esperanto Triumfonta (187, 188). En la numero 188 oni anoncas, ke la Organiza komitato por starigo de monumento al Zamenhof klopodas ĉe la pola registaro pri permeso de enirigo de l' monumento Polujon sen limdepagoj kaj dogantaksoj. La komitato ripetas la alvokon pri alsendo de monpagoj. Numero 187 enhavas intervjuon kun la fama lingvisto prof. Baudouin da Courteney pri Esp. por la esp. gazetaro kaj speciale por Esp. Triumfonta. — Holanda Esperantisto (116, 117, 118, 119).

Pola Esperanto Asocio
por
Zamenhofa Monumento.

Baldaŭ sur tombejo en nia pola ĉefurbo devas stariĝi la monumento de nia kara Majstro kaj granda samlandano. Malfacilaj financaj cirkonstancoj ĝis nun ne permesis al polaj samideanoj subteni la pian agon de tutmonda esperantistaro.

Nun venis la ĝusta kaj lasta momento. Ni malfermas kolektliston. Ĵetu malavare ankaŭ Vian obolon por honorigi la genian kreinton de Esperanto.

Unua kolekto.

So	Stanisław Karolczyk .	20 kronoj danaj
„	Jan Kostecki . . .	30.000.000 mk. polaj
„	Włodzimierz Miernicki	30.000.000 „ „
„	Prof. Jerzy Loth . .	50.000.000 „ „
„	Kazimierz Tymiński .	1 dolaro usona
„	Stanisław Essigman .	30.000.000 mk. polaj
„	Dro Szymon Karlsbad	10.000.000 „ „
„	Antoni Stankiewicz .	5.000.000 „ „
Sino	Eugenie Cense . .	10.000.000 „ „

Pluajn oferojn akceptas Pola Esperanto Asocio, Królewska 19, Warszawa.

Zarząd Pol. Tow. Esp. zawiadamia swych członków, że zebrania odbywają się co czwartek od 8-10 wiecz. w lokalu Tow. Królewska 19. Kancelarja i bibljoteka czynne są o tej samej porze.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.
Funkcias nur lunde kaj jaŭde de 8—10 h. vespere.

Presejo: EDMUND KOKORZYCKI, ŁÓDŹ, Podleśna 26.